

LA VERDA LUPEO



INFORMILO de ELF/AREK

Aprilo 2023

55-a jaro

N-ro 192

Esperanto-Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcia skipo: Bert BOON - Merelhof 8 - BE-3300 Tienen

Elda DOERFLER - Via del Ghirlandaio 18/1 - IT-34138 Trieste

James REZENDE PITON - Rua Aristides Perini 48 - BR-13141-025 Paulínia-SP



Sendodato de la poŝtkarto: 20^{an} de Januaro 1909.
La pk flugis de Bavario ĝis Francio. Ĝi estis eldonita de
d-ro Kleider, membro de TEKA - Tutmonda Esperantista
Kuracista Asocio - loĝinta en Nurnbergo.

KARAJ GELIGANOJ!

Ĉi-foje ne estas via prezidanto kiu “parolas”, sed via redaktoro. Mi estas tre tre hontema, pro mia daŭra malfruo en aperigo de LVL, problemo kontraŭ kiu tamen ankoraŭ mi ne sukcesas trovi rimedon. La kaŭzoj estas pluraj, la plej nesuperebla estas tempomanko, plus la amasigo de la jaroj sur miaj ŝultroj. Nu, nuna via tasko estas ekpripensi, serĉi novan redaktoron: *jam temp' està!*

Nun iom pli interesa novaĵo: ĉi-jare, dum la UK okazonta en Torino, estas jam delonge mendita salono, dum du horoj, pli precize dirite, dum po tri kvaronoj, kun inter la unua kaj dua paŭzo 15-minuta. Gvidos la kunvenon, malfermitan al Elf-Arek-anoj kaj simpatiantoj, scivolemuloj, interesiĝ-antoj ks, la fama kaj kompetentega filatelisto James Rezende Piton. Ne perdu la ŝancon ĉeesti liajn valorajn intervenojn. Estos ankaŭ tempo por interŝanĝado, rigardado kaj aĉeteblo de diversaj duoblaĵoj, je tre moderaj prez-oj (la monrezulto eniros rekte la Elf-Arek-an kason), konatiĝo kun samlig-anoj ktp. Ankoraŭ ne pretas la UK-programo, tial neebblas scii je kiuj dato kaj horo okazos la renkontiĝo. Ne forgesu jam sabate la 29^{an} de julio, je la 18^a horo viziti nian budon dum la Movada Foiro kaj - se vi havos emon, deziron aŭ volon - eĉ helpi la tiean deĵoranton!

Rezulto de la AMO-konkurso, rilata al la KOR-poŝtmarko kroata emisiita februare 2015 kaj proponita en LVL - aŭgusto 2022: kun mia ega bedaŭro, tiu konkurso vekis preskaŭ nulan interesiĝon - mi devas konfesi ke aperis nur manpleno de partoprenintoj. Sed, feliĉe, aperis kiu solvis brile ĝin: temas pri ĵus bakita esperantisto kaj filatelisto, jam ano de nia Ligo, Andrea MAESTRI, kiu respondis ĝuste al ĉiuj 4 demandoj. Gratulojn al li, dankegon pro lia akcepto de tiu defio! Li ricevos abundan materialon filatelan kaj esperantaĵan, laŭ sia elekto. Bonan somerumadon al ĉiuj!

Via Elda

ENHAVO	
Elda DOERFLER - <i>Vortoj de via prezidanto</i>	2
Elda DOERFLER - <i>Proe aŭ malproe?</i>	4
James REZENDE PITON - <i>Ferdinand Doré (1860-1922) Esperantista Entreprenisto</i>	13
Roberson Mauricio CALDEIRA NUNES - <i>IPM pola kun framasona Zamenhof</i>	15
Roberson Mauricio CALDEIRA NUNES - <i>Migrantaj kartoj</i>	16
Albert Boon - <i>Rarega, neuzita glumarka provo el 1952</i>	22
Elda DOERFLER - <i>Aperis en 1930...</i>	23

PROE AŬ MALPROE?

Elda DOERFLER

Antaŭ kiom da jaroj naskiĝis Esperanto? Ja, facilas tion ĉi ekscii: sur komputila ekrano ie troviĝas ankaŭ kalkulilo, kiu rapide solvas la problemon, samtempe nocante la cerbon, kiu iom post iom iĝas malpli kapabla funkciigi plene siajn nervoĉelojn, eĉ por simpla subtraho!

Do, ne gravas: sen aŭ per, ja la rezulto estas, ke 136 jaroj pasis de ĝia apero. Kiom da malfacilaĵoj, kiom da subitaj entuziasmoj, kiom da profundaj senkuraĝiĝoj kaj deprimoj, kiom da gloraj momentoj! Dum la lingvo disvolviĝadis, kreskis, luktis senarmile por atingi ĉiun mondoparton, por realigi la tiom deziratan interfratiĝon homan, kiom da eventoj, kiom da malakvoj, kiom da progresoj ĝi vidis kaj travivis, ene kaj ekstere de sia komunumo!



Per Esperanto oni kuracas internacie la vundintojn
Per Esperanto oni kuraĝigas la fremdajn mortantojn

1911 - Eldonis Alice Farges; desegnis A. Demasles. "Per Esperanto oni kuracas internacie la vundintojn [tiel!] Per Esperanto oni kuraĝigas la fremdajn mortantojn".

11^{an} de novembro 1918: la militdeklarintoj devigis la pacamantajn kaj idealemajn esperantistojn, eĉ militfronti la alinaciajn samideanojn. La kuntrenintaj Landoj estis sume 28: kia sensenca hororaĵo! Eĉ tiaĵojn tamen la homoj kapablas elteni, klopodas superi

Eldonis la Laborista Societo, fondita en Parizo, (1907). Desegnis esperantisto Ludoviko Rodo, konata skulptisto kaj grafikisto, filo de la fama pentristo Camille Pissaro.

Pro artikolkialoj, bedaŭre mi devigas vin memori pri la plej gravaj katastrofoj, kiuj brulstampis la 20^{an} jarcenton, nome la du mondmilitoj. La unua ekis je la 28^a de julio 1914 kaj finiĝis la

MILITARISMO



Vi jam prenis mian viron, sed tiun ĉi vi neniam havos!

kaj iel, iom post iom, sukcesas repreni en siaj manoj propran vivon. Ne superis tion tamen nia Majstro, kies febla koro ne estis tiom forta por elporti tian kruelan sortobaton: revoj ne plu sufiĉis al li, kiam ĉirkaŭe la morto falĉadis sennombrajn viktimojn - li mortis, jes, pro sia kormalsano, sed al tio aldoniĝis peza animsufero, kio estis certe la precipa morto-kialo.

Paco estas, kaj estos, eterna utopio: post nur dudeko da jaroj, eksplodas la dua milito (1^a de septembro 1939 - 2^a de septembro 1945). Eĉ pli terura - se tiel diri - ol la unua, kvankam ĉiu ajn, granda aŭ malgranda, milito estas ĉiam ekstreme terura: fine, per kiaj rimedoj, per kiaj instrumentoj oni povas, kaj rajtas, *mezuri*, kiu milito estas la plej horora?

En ambaŭ militoj perdis sian vivon milionoj kaj milionoj da personoj, civiluloj kaj militistoj: se kredi al la statistikoj, ĉirkaŭ 10 milionoj pro la unua mondmilito kaj kaŭze de la dua, inter 55 kaj 60 milionoj da personoj, neblas ekscii la precizan nombron.



Pro kio ĉi longa enkonduko? Antaŭ preskaŭ 5 monatoj en reta aŭkcio aperis poŝtkarto, ege ege interesa, surhavanta la daton "1. 12. 1938", nu ekzakte dek monatojn antaŭ la eko de la plej kruela interhoma abomenaĵo.

Ni kune, er-post-ere, ĝin ekzamenu atente. Sur la poŝtkarta fronto: maldekstre, supre, surprisita ronda simbolo de Germana · Esperanto · Ligo, kun

- je ĝia centro - verda stelo, kies konturoj estas blankaj kaj verdaj. Tute apude, la adreso de GEL, helverda.

GEL estis la asocio de germanlingvaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio (1924-1938). Tiam, en tiu ŝtato, vivis multnombra germana malplimulto, ĉirkaŭ kvarono de la tuta enloĝantaro, la tiel nomataj *sudetgermanoj*. La Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista (ĈEA) kunigis ĉeĥojn, slovakojn, hungarojn, polojn kaj ukrainojn. Tial la germanoj decidis fondi, en 1924, propran asocion, nome la Germanan Esperanto-Ligon en Ĉeĥoslovakio (GEL). Samtempe do ekzistis du E-asocioj, tiu slava kaj tiu germanlingva, kio kaŭzis kelkajn problemetojn ankaŭ sine de UEA.

Ni revenu al la pk. Ĝi estis adresita al Teo Jung (1892-1986), germano, esperantisto ekde 1909, fondinto kaj redaktoro de la semajna ĵurnalo *Esperanto Triumfonta* (1920), kies titolo estis ŝanĝita en 1925 al *Heroldo de Esperanto*, eldoninto kaj mem aŭtoro de pluraj verkoj. La pk estis sendita al lia adreso en Schveningen, Holando.

Sur ĝi aperas du diversaj stampoj: unu ruĝa kaj tri aliaj nigraj.



Foto de Teo Jung, aperinta en *Enciklopedio de Esperanto*, jaro 1930 ĉ.



Luftschiffs Graf Zeppelin fährt in das befreite Sudetenland


Aerŝipo Grafo Zeppelin vojaĝas en la liberigita Sudetlando

Flug- kaj aerŝip-haveno estis Frankfurto ĉe Majno. Du malsamaj pm-oj estis surgluitaj. Kvin el ili, divers-koloraj kaj -valoraj, bildigas generalon kaj politikiston Paul von Hindenburg (1847-1934). Li estis, de 1925 ĝis sia morto, la dua prezidanto de la Vajmara Respubliko. Estis li, kiu fine de januaro 1933 nomumis Adolfon Hitler regna kanceliero de Germanio. La lasta en ĉi-suba serio estas 15-penca aviad-poŝtmarko: sur ĝi, aglo ĉirkaŭfluganta la mondon, kiu duonkaŝas sunon (?) kun centra hokokruco.



Sur la malantaŭa flanko, la skribaĵo de la germana esperantisto Bruno Gahler el Reichenberg¹⁾ (Sudetlando - NdR: pri ĝi eta noto fine de ĉi artikolo).

Kore samideano, ĉef ĵurnalisto - Dec. 1938.
 Dankon por via letero kaj la publikigo de la
 fildoj en via HdE, kiu antaŭe dissemigis festis
 sian 1000 fojan aŭeron.
 Ĝratulan akceptu iom malpure sed
 tamen ne melpi kore.
 En la 1000a numero troviĝis mia varbteksto
 kaj hazarde (?) en la 900a troviĝis mia letero kiu
 mi sendis al v. ŝere de la organizfermo en Germanujo.
 Kion alportas la 1100a HdE?
 Ĉi tiu letero akceptata per ĉi tiu poŝtkarto,
 kiu 8277 fojis de la 1100a al la libera Sudetlando
 Germanujo per "Post-Express".
 Am 4. Dezember
 Heil Hitler



Sur ĝi, inversigita, maŝinstampo kun jena teksto:

La 4^{an} de Decembro Via »Jes«
 al la Gvidanto

Laŭ mia kompreno la pk foriris
 la 2^{an} de decembro de Reichen-

berg (Sudetengau). Tiu ĉi stampo estis propagandilo pri la baldaŭaj elektoj okazontaj je la 4^a de la sama monato en Sudetlando. Tiuj estis la lastaj elektoj sub la nazia regado.

Kion skribis Bruno Gahler al Teo Jung? Tutunue siajn gratulojn okaze de la 1000-foja apero de *Heroldo de Esperanto* (HdE), *Oficiala Semajna Organano de Internacia Esperanto-Ligo*, N-ro 44 (1000), deknaŭa kolekto, 20 Novembro 1938. Li mencias, ke en ĉi 1000^a numero troviĝas varbteksto, de li verkita. Jes, veras! Vi trovos ĝin je la kvara paĝo, en la kolekto de Esperantomuzeo de Aŭstria Nacia Biblioteko²⁾. En la 900^a numero estis publikigita lia letero okaze de la organizfermo en Germanujo. Post tio li

1) Hodiaŭ Liberec, Ĉeĥio.

2) <https://anno.onb.ac.at/cgi-content/anno?id=e2j&datum=19381120&seite=1&zoom=17>

sin demandas: *Kion alportos la 1100a HdE?* Fine salutvortoj: *Estu kore salutata per ĉi tiu poŝtkarto kiu vojaĝis de Frankfurt al la Libera Sudetlando Germana per "Graf Zeppelin"*.

Per 'Heil Hitler' finsalutas Bruno Gahler.

Ni iom esploru la esperantistan vivon de Bruno Gahler. Li estis membro aktiva de Germana Esperanto Ligo G.E.L., supozeble ekde ĝia fondiĝo



(1924). Unuafoje mi rimarkis lian nomon en *MARTO*, la Oficiala organo de GEL, - januaro 1932, 16^a jaro - kaj tuj poste en tiu de marto: en tiuj, en du partoj, estis publikigita, en *Mitteilungen des*

Bundes deutscher Esperantisten in der tschechoslowakischen Republik - Aldonaĵo al MARTO, eldonita en Reichenberg, lia traduklaboraĵo *Tra Riesenmontaro dum neĝuragano*. En n-ro 6-7, juni-julio 1933, legeblas pri la monataj programoj en E-kluboj de Reichenberg kaj Gablonz: en ĉi lasta li prelegis pri *Kiam sur maro noktiĝas*. Tiu ĉi interesa eltrovo instigis min plu esplori.

Laŭ aliaj informfontoj en Vikipedio, oni ekscias, ke en 1934 la redaktoroj de *MARTO* estis Josef Pontz kaj Bruno Gahler. Bedaŭrinde tiu interesa revuo ne plu estis publikigita ekde aprilo 1934: ĝin anstataŭis la simpla *Informilo de GEL*, asocia bulteno aperanta sesfoje jare, senpaga por la membroj, sub redaktado de B. Gahler kaj inĝ. Gustav Scholze, prezidanto de GEL kaj profesoro ĉe la supera industria lernejo en Reichenberg.

Nur kelkaj vortoj pri inĝ. Scholze, la reorganizinto de la E-movado inter germanoj en Ĉeĥoslovakio kaj GEL-prezidanto de 1932 ĝis 1938.

Lerninte Volapukon, post hazarda renkontiĝo kun Esperanto li aliĝis al ĝi.



Persone li konatiĝis kun nia Majstro. Komitatano de UEA, li partoprenis en la du konferencoj pri *Esperanto en la scienco kaj komerco*, okazintaj en Parizo (1925).

Li enkondukis Esperanton ĉe la loka komerca foiro kaj plie kunlaboris pri farado de teknika fakvortaro. Dum la foira periodo estis videblaj oficialaj skribaĵoj esperantlingvaj en la foiro mem,



plus je dispono de vizitantoj estis multaj varbiloj pri GEL. Krome la esperantistoj ricevis, ĉiujare, senpagan standon por propagandado.

Post la deviga forlaso de Ĉeĥoslovakio, fine de la 2^a mondmilito, Gustav Scholze iris al Munkeno, kie plue li aktivadis en la movado [info el EdE].



■ La Praktiko, januaro 1939: reklamo pri Esperanto en la sudetgermana urbo Reichenberg, tuj post la germana okupacio

Kaj kio, post 1938, estis okazinta al la Ligo? Ĝia agado estis haltigita sekve de la germana invado de la ĉeĥlandlimaj regionoj, pro adaptiĝo al la postuloj de naziismo. Tamen, kiel atestas la flanko bildo, aperinta en *LA PRAKTIKO*, januaro 1939, ekzistis ankoraŭ iom da toleremo. [...] Post kiam la germanlingvaj regionoj de Ĉeĥoslovakio fariĝis parto de Germanio, la Informilo de la Ligo diris simple ke la landlimoj ŝanĝiĝis kaj la menciitaj urboj ne plu situas en Ĉeĥoslovakio sed en Germanio [...] (El *Historio de UEA*, Ziko van Dijk, 2012 Espero)

Denove pri Bruno Gahler: kiam li eklernis Esperanton? Preciza dato ne troveblis, sed plej probable tio okazis antaŭ la 1920^{-aj} jaroj.

En suba poŝtkarto, kun la pm kaj glm pri la 14^a




Esperanto-Kongreso de IFEF, en Budapeŝto, 5-11 majo 1962, troviĝas interesa sciigo: la pk estis eldonita de familioj Gahler, Ullrich kaj Weber honore de Franz Gahler, 1877-1953, el Trautenau, Sudetlando. Li estis lokomotivestro kaj esperantisto. Patro de Bruno, li estis kiu instigis la filon lerni Esperanton. Krome, aŭ li mem aŭ lia filo alproksimigis al la internacia lingvo la nevon, respektive kuzon, Alfred. Pri Alfred ne multo konatas, nur ke li publikigis kelkajn artikolojn en *HdE* kaj ke prelegis en la Reichenberg-a grupo, kie foje li sekretariis kaj eĉ funkciis kiel vicprezidanto. En la revuo *La Ponto*, eld. de GEA, 1953, aperas anonco pri lia morto.

En *MARTO* - junio 1924, nr. 6, aperas detala raporto pri la, okazinta en Reichenberg, 2^a Ĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso, kunorganizita de ambaŭ asocioj, nome ĈAE kaj GEL. Prezidanto de la LKK estis inĝ. Scholze. Ĉeestis delegitoj el 57 diversaj en- kaj ekster-landaj lokoj. Salutparoladoj estis faritaj de multaj gravuloj lokaj, regionaj, naciaj. Vere impona evento! Estis menciite, ke i.a. “*unuakta burleskaĵo «Sinjoro Herkules», ludata de ambaŭ naciaj Reichenberg’aj Esper.-grupoj zorgis por ridado!*” Inter la rolantoj aperas la nomoj de Bruno kaj Alfred Gahler.

La supra informo plus la multaj artikoloj, verkitaj de Bruno kaj legeblaj ĉefe en *MARTO* kaj *HdE* (NdR: *periodaĵoj en retejo E-Muzeo Vieno*), atestas pri lia bonega regado de la lingvo Esperanto: la enhavo de liaj skribaĵoj estas ĉiam bonstila, kun oportuna elekto de vortoj, samtempe klare komprenebla, fojfoje eĉ tro polemika. Sed pri tio ne mi rajtas juĝi, ankaŭ pro la fakto ke tiuj liaj esprimoj, liaj priskriboj distingeble evidencigas ian ne plu elteneblan suferadon - por li kaj liaj samnacionoj - pro malĝojiga situacio. En *HdE*, 1931.12.25, li atentigas denove per artikolo titolita *Sudetgermanaj aferoj*, ke, *La mizera stato ekonomia de l’ nuntempo kaŭzis, ke en nia teritorio ok homoj fariĝis viktimoj de mortigaj bataliloj. En la silezia distrikto Frejwaldau tieaj laboristoj aranĝis tielnomatan “malsatmarŝon” al la distrikta ĉefurbo, por protesti kontraŭ malaltigo de la jam mizera salajro. Intervenis ĝendarmoj kiuj pafis kontraŭ la marŝantoj. Aliloke, li plendas pro lingva maljusteco en la radiosfero de nia ŝtato. [...] Kvankam la sudetgermana abonantaro de la koncesiita ĉeĥoslovaka sendasocio “Radiojournal” formas proporcie grandan parton de la paganta membraro, la dissendo en germana lingvo estas limigata je bagatelaj 35-40 minutoj potage (tiel!) dum maloportuna tempo (post la sesa vespere, kiam oni hejmeniras post la laboro). [...] Estas simpla devo de ĝentileco almenaŭ unufoje dum semajno aranĝi germanlingvan vesperprogramon por kompensi ankaŭ la sudetgermanajn kotizopagantojn. [...]*


Interesa artikolo aperas en *HdE*, jam en 1920, n-ro 43, kie li klarigas pri la ne tolerebla laborsituacio de la sudetgermanoj en Ĉeĥoslovakio. Ĉefe li atentigas ke *Materia mizero minacas al loĝantaro de kelkaj regionoj en German-Bohemio kaj en la orienta Riesen-montaro en Trautenau.*

La 22^{-an} de februaro 1951, alia pk, de Gahler eldonita, memorigas ke la tuta tiama situacio ankoraŭ lin turmentadis. *Mondo aŭskultu! Tri milionoj da sudetgermanoj repostulas la rabitan hejmlandon! Mondfamaj sudet-*



germanaj urboj: Eger, Karlsbad, Aussig, Reichenberg, Gablonz, Trautenau, Zwittau, Troppau. Riveroj: Elbe, Egerm, Neisse, Oder. Montaroj: Böhmerwald, Erzgebirge, Riesengebirge (Sudeten). Kamparanoj! Helpu prilumigi tion!

Kiel supre indikite, en tiu tempo, jaro 1962, Bruno loĝis en Glinde, je ĉ. 25 km de Hamburgo, en Esperanto-Weg, kiel estas skribite en la dekstr-flanka pk. K-do B. Gahler informas pri tio en *Sennaciulo*, je la 1^a de oktobro 1952. Samnumere li plu mencias: Mi pledas por la re-*hejmigo* de la *sudetgermanoj*, kiuj estas forpelitaj el sia iama patrio, k defendas sin pri la akuzo esti nomata naciisto.



Postkarte

Glinde, apud Hamburgo, havas "Esperanto-Weg" (Esperanto-straton) kaj tiel vere efike reklamas la mondlingvon kaj la interkomprenon de la popoloj.

GLINDE bei HAMBURG hat einen ESPERANTO-WEG und weist damit vorbildlich auf die Weltsprache und wirkliche Völkerverständigung hin.

Bruno Gahler, (24a) Glinde-Hamburg, Esperanto-Weg



Unua numero de Fenikso, post la fondo de AREK: 01.10.1968.


Sube, n-ro 3, 01.04.1969



ni memoru, ke uzo de Esperanto estas permesita por ĉiuj celoj. Fakte li parolis pri la pk videbla sur la antaŭa paĝo, pledanta pri Sudetlando. Li konkludis, dirante: ... Do, ni AREKanoj havas grandan privilegion. Utiligi ĝin eĉ se vi ne estas samopinia kun s-ro Gahler. Estas ja Esperanto-manifesto...

Tio en 1968. Poste nenie troveblis signoj pri li, aŭ, pli bone dirite, nenion alian mi malkovris.

Estas nun la momento por reveni al la temo de ĉi sufiĉe longa artikolo, nome la iom perpleksiga saluto al Teo Jung: *Heil Hitler*. La pk estis sendita decembre 1938. En marto tiujara Germanio estis invadinta Aŭstrion,



oktobre okazis krizo en Ĉeĥoslovakio, kio kaŭzis, ke en tuta Eŭropo oni ektimis pri milito. Kontrol-

ado de korespondaĵoj estis ordinara afero, tial certe oni klopodis iel protekti sin. Plej probable oni supozis, ke alkonformigado al cirkonstancoj, ŝajnigo de propraj tendencoj al 'samdirektigo', povus eviti danĝerajn konsekvencojn. Ekz., Anton Vogt, vicprezidanto de UEA ekde 1934, subskribis kelkajn leterojn per "kun germana saluto" [...] (el *Historio de UEA*, pĝ. 111).

Tamen, kiel mi jam aludis pli supre, vere malfacilas prijuĝi tiajn farojn. Ne vivinte en la samaj situacioj, oni havas nenian certecon pri justa taksado de la tiamaj germanaj esperantistoj. Kiel skribas Ziko van Dijk en sia nepre leginda “Historio de UEA” (pĝ. 172), *ne eblas klare ekkoni ĉu iu ago aŭ eldiro havis taktikan aŭ ideologian motivon.*



Je la 113^a paĝo de *La danĝera Lingvo* (Ulrich Lins 1998): *Estas maljuste kondamni la tutan membraron de GEA pro infektiĝo per brunaj virusoj. Kiel diris germanaj esperantistoj por sia pravigo post la milito, ili nur alekstere, kunpremante la dentojn, ŝajnis, «ke la Esperanto-klubo harmonias kun la 'naciaj konceptoj', por tiamaniere savi ĝian transvivadon.»*

Konklude, la kialo de tiu ĉi mia artikolo estis nur konatigi al vi esperantiston, iun ajn esperantiston, ne eksterordinare faman en tutmonda Esperantujo, kies precipa celo estis pere de Esperanto transdoni al aliaj siajn pensojn, siajn travivaĵojn, sian vivkoncepton. Li multon agadis favore al disvastigado de nia lingvo. Li estis fervora subtenanto, age kaj mone, de UEAJ (*ĉu*

vi konas ĉi akronimon? UEAJunularo!), li instruis, prelegis, redaktoris, tradukis kaj verkis. Do, entute aktivega samideano.

Prijuĝu, se vi opinias tion necesa!

Noto: tre tre koncize, io pri Sudetlando. Estis tiel nomita la regiono ĉirkaŭanta la reliefon kaj Sudetoj la germanlingva loĝantaro, kiu tie ekloĝis ekde la 10^a kaj 11^a jarcentoj, ĉefe en la urboj, kie regis industria kaj komerca agado. La “disputo” pri Sudetlando estis la kaŭzo de seriozaj konfliktoj en la unua duono de la 20^a jarcento. Fine de la unua mondmilito, kun la Traktato de Saint-Germain (1919) tiu parto estis transdonita al la nove establita Ĉeĥoslovakio, kiu tiel enprenis ĉ. tri milionojn da germanoj. En la 1920^{-aj} jaroj du naciismaj partioj establiĝis inter la Sudetgermanoj, kunfandiĝante en 1933 en la Sudetgermana Partio, kiu - sub la gvidado de K. Henlein - iĝis la ilo kiun Hitler uzis por aneksi Sudetion al Reich. En aprilo 1938 la partio prezentis programon de ekstremaj postuloj, celante praktike disiĝon de tiu regiono de Ĉeĥoslovakio. La 12^{-an} de septembro, Hitler publike prenis pozicion favoran al postulo de Henlein, kiu rompis la interkonsenton kun Prago, petante aneksadon al Germanio. La anglo-franca propono, ke Ĉeĥoslovakio forlasu ĉiujn teritoriojn kun almenaŭ 50% de germanlingvaj loĝantoj, estis tamen rifuzita de Hitler.



Por eviti konflikton, la brita ĉefministro Chamberlain proponis konferencon de britaj, francaj, germanaj kaj italaj registarestroj, kiuj, dum la kunsido en Munkeno, konsentis pri la aneksado de la S. al Reich. Post 1945 la plej multaj el la sudetgermanoj estis forpelitaj el la rekonstruita Ĉeĥoslovakio.

Fontoj: Historia enciklopedio TRECCANI; Bildo el Vikipedio - nigre la Sudeta regiono

FERNAND DORÉ (1860-1922)

ESPERANTISTA ENTREPRENISTO

James REZENDE PITON

“Pri la ŝtrumpa truo scias nur la ŝuo” estas simpatia proverbo en la zamenhofa kolekto. Sed pri ŝtrumpaj truoj havis zorgojn ankaŭ alia esperantisto, kiu famiĝis en sia regiono.

Fernand Doré naskiĝis la 19^{an} de Marto 1860 en la nordorienta regiono de Francio, en la departemento Aube. Li estis industriisto en la subvesta branĉo, ĉefnegoco en lia loĝurbo Troyes, kie pluraj fabrikoj de trikotajoj estis instalitaj. Paululo de Fernand, metiisto, fondis la entreprenon en 1819.

Fernand Doré estis entreprenema. En aprilo 1899 li fondis entreprenon “Sukerejo Piracicaba”, kun kapitalo je 2,2 milionoj da francaj frankoj. La nomo rilatas al urbo, kiu estis grava sukerfabrika centro en Brazilo. Tri monatojn poste la brazila prezidanto subskribis dekreton, kiu permesis la funkciadon de tiu entrepreno en la lando. Alia dekreto de la sama prezidanto, en 1901, rajtigas alian entreprenon de Doré akiri kaj ekspluati terpecon je 15 kvadrataj kilometroj en Capivari, ŝtato San-Paŭlo.

Fernand prezidis sportajn kaj turismajn asociojn. Kiel li eklernis Esperanton meritas esploron, sed sciatas, ke la 24^{an} de Oktobro 1903 li fondis la E-grupon de Troyes, kies prezidanto li restis ĝis sia morto. Li faris prelegojn pri Esperanto en la regiono, verkis artikolojn.



Li partoprenis la unuan UK-n en Boulogne-sur-mer, en kiu li prezentis humuran monologon de li mem tradukitan, “Solo de Fluto”, verkita de Paul Bilhaud. Tio aperis kiel 20-paĝa broŝureto en 1907 (kaj rimarku la amuzan bildon sur ĝia kovrilo) kaj ĝia mallonga enhavo estas disponebla ĉe <https://arkivo.esperanto-france.org/divers/bilhaud/flutsolo.htm>

Doré estas videbla en la komuna foto de kongresanoj en Boulogne (n-ro 81 en ekzemplero ĉe la kolekto de Aŭstria Nacia Biblioteko).



Iniciatema, li starigis en Troyes en 1909 la grandan feston de la trikotajoj, por kiu elektiĝis “reĝino”. En grandaj paradoj de la festo, aliaj ekonomiaj branĉoj montris sin. Tiu sukcesa iniciato ripetigis ĝis 1938. En bildkartoj, kiuj dokumentas la feston, jen nia esperantisto en elstara loko.



En 1920 la Konservatorio de Troyes estis kreita kiel privata muziklernejo, sed en tiu sama jaro Fernand Doré kreis societon por subteni la Konservatorion. En 1922 la muziklernejo instaligis en konstruaĵo, kiun Doré donacis al la urbo. En 1924, la lernejo fariĝas urba kaj en la sekva jaro deklarita “Nacia muziklernejo”. La konstruaĵo inter 1940 kaj 1944 estis sidejo de Gestapo, dum la longa nazia okupacio de Francio.

Fernand Doré forpasis kaŭze de akcidento en Troyes, la 7^{an} de februaro 1922. Li estas omaĝita i.a. per stratnomo en la urbo kaj ankaŭ la nomo de 150-sidloka salono kun podio.

IPM POLA KUN FRAMASONA ZAMENHOF

Roberson Mauricio CALDEIRA NUNES

Esperantujo bonvenigas subtenantojn de multaj movadoj (filozofiaj, religiaj, politikaj ktp), inkluzive de framasonismo.⁽¹⁾⁽²⁾ Sed ĉu Zamenhof mem estis framasono? Tiun demandon jam faris kelkaj samideanoj, inkluzive nia kormemora Jean Amouroux.⁽³⁾ La respondo verŝajne estas ne, sed tio ne malhelpas iujn pensi alie.

Pasintjare, kiam mi serĉis filatelaĵojn en interreto, kiel kutime, mi trovis tuthazarde en brazila TTT-paĝo⁽⁴⁾ la jenan individuan polan PM-on:



Maldekstre de “160” videblas la framasona simbolo

Ĝia teksto estas “L.L. Zamenhof 160 Framasonismo kaj Esperanto unuiĝinta[j] por pli bona mondo[] kaj [??]”. Oni povas dedukti ke “160” rilatas al naskiĝo de Zamenhof, ĉar $1859 + 160 = 2019$, konsekvence 2019 devas esti la jaro de ĝia eldono.

Do mi mendis 2 ekzemplerojn de ĝi, kaj iom poste alvenis, bonsurprize, tiu ĉi paro:



Tiu “rapidresponda kodo” (angle *QR code*) en la malsupra dekstra angulo ligas al pola paĝo⁽⁵⁾, kiu estas konsiderata suspektinda de retsekurecaj programoj.

Hodiaŭ mi revenis al tiu brazila paĝo, sed bedaŭrinde la framasono Zamenhof ne plu estas disponebla por aĉeto.

Notoj:

- 1) <https://www.nodo50.org/esperanto/artikl00.htm>
- 2) <https://eo.wikipedia.org/wiki/>

Espero Framasona

(3) <https://web.archive.org/web/20081122001911/>

<http://www.aleph.com.br/kce/historio-04-z-framasono.htm>

(4) <https://www.brazilstamps.com.br/>

(5) https://www.filatelistyka.poczta-polska.pl/sklep_pl/poczta,witamy

MIGRANTAJ KARTOJ

Roberson Mauricio CALDEIRA NUNES


Antaŭ la Unua Mondmilito jam estis uzataj de esperantistoj la tiel nomataj *migrantaj kartoj*, speco da poŝtkartoj kies celo estis pligrandigi la reton de homoj kun kiuj korespondi kaj interŝanĝi objektojn. Aliflanke, tiaj kartoj servis por kolekti informojn pri la nombro de esperanto-parolantoj kaj aktivaj grupoj en diversaj lokoj.

La migranta karto estis sendita de A-lando al iu loĝanta en B-lando, kun la peto plusendi ĝin al alia persono en C-lando. Ĉiu nova esperantisto forstrekis sian propran adreson kaj aldonis novan, ĝis la lasta (kutime la kvara aŭ kvina) resendis la poŝtkarton al la origina sendinto. Tiamaniere, post iom da tempo, la unua forsendinto ricevis sian poŝtkarton kun la adresoj de samideanoj el la tuta mondo (plus diversaj poŝtmarkoj kaj poŝtstampoj).

La rumania hungaro kaj katolika pastro Andreo Cseh (1895-1979), kiu famiĝis pro sia originala sistemo por instrui Esperanton (Cseh-metodo), sendis ĉi migrantan karton (presitan en Usono) en la jaro 1913, kiam li havis 18 jarojn:



De la jaro 1919, karto sendita el Argentino atingis, inter aliaj samideanoj, Ismael Gomes Braga (1891-1969), verkisto de gravaj gramatikoj kaj vortaroj de esperanto por brazilanoj.



Tiu karto vere migris: Argentino, Francio, Britio, Belgio, Brazilo, kaj reire al Argentino - preskaŭ 26 mil kilometroj!

La pk ekmigris je la ? de majo 1919 kaj la 18^{an} de junio jam estis en Francio.

De tie ĝi iris al Anglio, kie ĝi alvenis la saman monaton je la 13^a tago.

S-ino Yvonne V. Havermate elprenis ĝin el sia poŝtkesto en Gent, Belgio, tri tagojn poste.

Fine ĝi atingis la urbon Ponte Nova, Brazilo, la 11^{an} de aŭgusto, kie loĝis la fama esperantisto Ismael Gomes Braga.

La migranta karto revenis al Vincento Orlando, Bahia Blanca, Argentino, la 26^{an} de aŭgusto 1919.

La pk tamen iomete paŭzis en Rio-de-Janeiro ekde la 27^a de julio, antaŭ ol atingi sian lastan stacion.

Inter iro kaj reveno pasis preskaŭ tri monatoj kaj duono.



En la jaro 1924, Sekcio de Migrantaj Poŝtkartoj de Internacia Esperantista Kolektanto-Klubo kaj Internacia Klubo de Esperantistaj Filatelistoj fondis monatan gazeton *Amikeco*, kiu pliigis eĉ pli la popularecon de migrantaj kartoj:



MIGRANTA KARTO.

GRAVA AVIZO: Oni povas aĉeti tiujn ĉi kartojn ĉe J. AKKERMAN, Ged. Oude Gracht 37, Harlemon (Holando), po 10 por 18 sd., 50 por 80 sd., 100 por 150 sd., *kune kun la sendoktoj.* Oni sendu monon, se eble, per respondkuponoj internaciaj.

migris: 16-6-24
Revenis: _____

Estimata Samideano!

Mi afable petas al vi, forsendi tiun ĉi karton al esperantista amiko en lando, kie ĝi ne estis ankoraŭ. Al ĉiu, kiel dankajon, mi sendos blason ilustritan karton de mia urbo. La kvara ricevanto bonvolu sendi ĝin al mia adreso ĉi sube.

Urbo: *Londono*
Nomo: *Dr. A. E. R. Rockwood*

Urbo: *Londono*
Ŝtato: *Universitato*

Lando: *Anglando*

	Nomo kaj adreso de la Ricevanto.	Ĉi vi deziras interŝanĝi posedaĵojn?
1	<i>Carl Gustaf</i>	P. I.
2	<i>Admiralo</i>	P. M.
3	<i>Wanderburg</i>	P. M.
4	<i>Wanderburg</i>	P. I.
5	<i>Wanderburg</i>	P. M.



La plejparto de la stampoj malbone legeblas, elstaras nur tiu farita en poŝtoŝejo de Buenos Aires - B - Argentina, kun dato de la 1^a de novembro 1928.



LA DU LASTAJ PM DE LA KARTO



*Ĉilio - Pm emisiita 1928
Manuel BULNES PRIETO (1799-
1866), generalo kaj politikisto.
Estis ĉilia prezidanto
(1841-1851).*



*Argentino - Pm emisiita
la 15^{an} de septembro 1927
José Francisco de San Martín
(1778-1850)
Generalo, patrioto kaj revoluciulo:
li ricevis la titolon de **Liberador**.*



La plej nova migranta karto, trovita en interreto, estas tiu de la jaro 1950 (de Argentino ĝis Svedio...):

JARO DE LA LIBERIGINTO ĜENERALO SAN MARTIN - 1950
Mikolektas p/markoj!
ESPERANTO migranta poŝtkarto

Numero **88**

Ekmigris **28.12.1950** Revenis

Kara samideano!

Ricevinte ĉi tiun migr. P. K. bonvolu transsendi ĝin al samideano en lando, kie ĝi ankoraŭ ne estis. Ĉiu ricevinto sciligu min, ĉu kaj kiam li ricevis la karton.

La kvina ricevinto afable resendu ĉi tiun P. K. al mia adreso:

Nomo: **RUBÉN L. GUIDOTTI**
 CASEROS N° 123
 CASEROS (Bs. As.)
 REP. ARGENTINA

Strato:

Urbo: *Rosario* Provinco:

Lando: *S-ro.*
I. Norden
Box 340 C.
ÄRJÄNG
(Värmland)
Suecia




Sur la karto aperas - kia hazardo! - ree poŝtmarko argentina dediĉita al la **Libe-rador**.

Ĝi estis emisiita por rememore honori lin okaze de lia 100-jara morto-datreveno (1850-1950).

La MK plej probable ne revenis al sendinto, Rubén L. Guidotti.

Ĉiujn bildojn mi trovis diversloke en interreto (interalie, en la tre interesa paĝo <https://bibliotekoj.org/esperantajbitoj/migrantaj-kartoj-postales-itinerantes.html>, eksepte de la migranta karto el 1919, kies uzo estis permesita de S-ro Pedro José Etchegaray Avallone, urugvaja filatela kaj numismatika komercisto (Aquelarre Hobbies), kiun mi elkore dankas.

RAREGA, NEUZITA GLUMARKA PROVO EL 1952

Albert Boon



Jen paro da glumarkoj, kreitaj okaze de loka kongreso en la franca urbo Evreux (departemento Eure et Loir) kun dorse ĉarnireto.

Koloroj: blanka (kolombo), blua (mondglobo kaj tekstoj) kaj flava aŭ... oranĝa (fono).

La ĉirkaŭa teksto en la franca: “SOUS LE HAUT PATRONAGE DE M. (onsieur) LE MINISTRE DE L’ÉDUCATION NATIONALE” = aŭspicio de sinjoro ministro pri nacia edukado.

Randaj surskriboj: “**CAMPAGNE MONDIALE POUR L’ESPERANTO**” = monda kampanjo por Esperanto / “**LANGUE UNIVERSELLE**” = universala lingvo / “**SIÈGE SOCIAL: ORLÉANS**” = sociala sidejo: Orleanso.



Ununura paro el tiuj glumarkoj estis sendita al la urbo Orleanso por surskribe aldoni la jenan kompletigan informon: “**ESPERANTO KONGRESO EVREUX 18 V 52**, en verda koloro.

Bedaŭrinde la malhelverdaĵoj estas apenaŭ legeblaj, la kolombo apenaŭ videbla, do la organizantoj decidis uzi la glumarkojn sen kroma teksto. Do, oficiale la varianto/provo tute ne estis emisiita.

La du provaj ekzempleroj do estas ege raraj kaj sufiĉe valoraj, unuflanke kiel filatelajoj kaj aliflanke kiel historiaj artefaktoj de Esperantujo.

APERIS EN 1930...

Elda DOERFLER

Ĉiutage eblas malkovri ion apartan, ion kio iel surprizas onin... Hazardo ludas ĉiam gravan rolon tiusence. Dum traserĉado en malnovaj E-ĵurnaloj, altiris mian atenton iu artikolo aperinta en la UEA-Esperanto, n. 361, Septembro 1930, kies titolo estas: *Detruo de marbirdoj*. Je eklego ĝi tuj tikletis miajn cerbo-neŭronojn (ho ve! pli kaj pli damaĝitajn), tiel ke mi rapide flugis al la koncerna paĝo kaj jen, glumarka bildo nigra-blanka rememorigis, ke tiu aperis, bele kolora, lastapaĝe de LVL 190 - aŭgusto 2022. Ĝin mi prezentis pro instigo de nia membro Jan Niemann, ĉar nenie legeblis iu eldondato kaj la intenco estis helpe de vi, karaj Liganoj, eltrovi, kiam kaj de kiu ĝi estis farita. Tiam, kiel probabla, ni supozis la jenan jaron: 1931^{an}. Kaj danke al tiu ŝanco nun senvualigas la mistero kaj, kio plej min mirkonsternis, estis la duonpaĝa artikolo, kies kelkajn partojn mi proponas al vi, ĉar la enhavo estas pli ol aktuala.



“Per la oleobrulaj ŝipoj venis terura minaco por la birdoj. La ŝipoj malŝarĝas en la maron sian uzitan oleon, dikan gudrecan substancon. Ĝi rifuzas subiri kaj kolektiĝas sur la supraĵo de la akvo en grandaj masoj, kiuj flosas tien-reen, portante morton kaj detruon al fiŝa kaj birda vivo. Kiam unufoje la birdoj kontaktiĝis kun tiu substanco ilia sorto estas decidita. Ĝi alghuigas al ilia plumaro, tiel ke ili povas nek naĝi, nek flugi, nek havigi al si nutraĵon, kaj ili disbatiĝas de la ondoj ĝis la morto finas ilian torturon...”

Tre bone konata problemo, ĉu ne? Statistikoj diras, ke ekde 1911 ĝis 2020 okazis ĉ. pli ol 90 ekologiaj katastrofoj kaŭzitaj de enmara verŝiĝo de petrolo. Du el la plej teruraj pro la grandiozega volumeno (700.000 - 1.500.000 tunoj) da nigra oro estis tiu en Persa Golfo, pro milito (1991) kaj en Meksika Golfo, Puto Makondo je 1500 m de profundo (2010; 414.000-1.186.000 tunoj). Eĉ ne imageblas la sekvoj de tiaj hororaj okazintaĵoj. Per tiu artikolo oni sciigas, ke jam en 1926 la ĉefaj marpotencoj okazigis en Washington Konferencon pri ‘Olea marpurigo de la maro’, dum kiu estis redaktita konvencio pledanta por leĝfarado, malpermesanta la eligon de eluzita oleo en regiono malpli pli ol 50 mejloj malproksima de iu ajn marbordo. Sed ĝi ne estis fine subskribita.

«La Reĝa Societo por la Protekto de Birdoj [NdR: ekzistas ankoraŭ nuntempe!] en Londono opinias, ke la plej kontentiga solvo de la problemo estas la instalo de oleapartigilo sur ĉiu olebruliga ŝipo, [...]. Tiuj maŝinoj apartigas la oleon de la bilĝo pretigante la oleon por refoja uzo, tiel ke nur la



ELF-AREK

Esperanto-Ligo Filatelista

Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj

Prezidantino:

Elda DOERFLER

Via Ghirlandaio 18/1 IT-34138 TRIESTE

testudo.ts@gmail.com

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPIITRRXXX Por: Elda Doerfler

UEA-konto: ELF/AREK - Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00

Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti la prezidantinon.

Kunredaktantoj: James REZENDE PITON - sudastelaro@gmail.com

Albert BOON, Esperanto-Numismatika Asocio bert.boon@skynet.be

ELF-AREK tt-ejo: www.kolektado.esperanto.cc



neutila bilĝo pumpiĝas en la maron. [...] Kun la celo direkti publikan opinion al tiu grava demando, [...] oni preparis glumarkojn (malgrandajn gumitajn bildetiketojn kun la vortoj: “Insiste petu, ke la ŝiposedantoj instalu olean apartigilon, por savi la marbirdojn” en lingvoj angla, franca, germana, hispana, itala kaj Esperanta.»

El ĉio ĉi rezultas la apero de tiu glumarko, probable jam eldonita antaŭ la 1930^a jaro de tiu bonfara organizo, registrita en Anglio kaj Kimrio kaj en Skotlando, fondita en 1889, por antaŭenigi la konservadon kaj protekton de birdoj kaj medio, per publikaj konscikampanjoj, peticioj k.s. Ĝia origino fontas el agado de s-inoj Emily Williamson kaj Eliza Phillips k.a. kiuj ekkampanjis kontraŭ la virina modo tiutempa, ornami ĉapelojn per plumoj de ekzotikaj birdoj, kies komercado tiam estis tre vasta. Tiu societo havis antaŭ 1898 ĉirkaŭ 20 000 membrojn.

Nu, interese, ĉu ne, kiom da informoj povas doni tre simpla glumarko. Ja, **La Glumarko**, nuntempe tute ne priatentata, konsiderata preskaŭa stultaĵo..., sed se oni ne tiom supraj rigardas ĉion kio eniras nian vivon, povas malkovri multajn gravaĵojn, el kiuj la plej interesa estas, ke jam fine de la antaŭpasinta jarcento oni priokupiĝis pri medio, pri faŭno kaj flaŭro, agente kaj laborante konstante por konsciigi la homojn pri la katastrofaj konsekvencoj de propraj malbonaj misfaroj.